

Theodor Storm,
Hiacintoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Trankvila nokto estas tie ĉi.
Per dorm-odor' la plantoj min alspiras.
Mi pensis ĉiam, ĉiam nur je vi,
Dormemas mi, sed danci vi deziras.

Seninterrompe frenezadas ĝi.
La violonoj krias, jen disiĝas
La vicoj de l' dancantoj kaj kuniĝas.
Dum ardas ĉiuj, pala estas vi.

Premetas vi en brakon vin alian.
Ho, ne suferu pro perforto vi!
Kaj preterflugi blankan robon vian,
leĝeran korpon vian vidas mi.

Sonĝige dum ĉi tiu nokto pli
da dolĉo la kalikoj nun elspiras.
Mi pensis ĉiam, ĉiam nur vi.
Mi emas dormi, danci vi deziras.

*Traduko de la Germana poemo "Hyazinthen" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2002-04-07.*

MR-383-1 / Arg-188-379 (2004-02-24 22:47:23)